# NIA PONTO



Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)
TTT-ejo: esperantobilbao.tk

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com

**Jar-kotizoj**: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**MAJO/OKTOBRO 2014** **Nro. 100 (3/14)**


# 100 NUMEROJ DE "NIA PONTO"!!!



GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

NIA PONTO

Barrencalle Barrena, 7 - 1.°
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

1ª Jaro Februaro 1.987 Nº. 1 (1)

Nova epoko.- Jen, ekde nun, nia cirkulero havas novan formaton kaj propran nomon. Sed, kial ni elektis "NIA PONTO"-n?.

Unue, ĉar ni deziras esprimi ion specife nian, kio estas uzata de ni ĉiuj, de niaj samurbanoj, sed kio, samtempe, signifas komunikadon inter ni kaj la aliaj, kaj certe la ponto, diversaj en nia urbo kaj necesaj por transiri nian riveron, ligiloj inter la malnova kaj la nova partoj el Bilbao, estas la plej alloga bildo, kaj ĉefa trajto de nia urba blazono.

Kaj iomete pli praktike, "NIA PONTO" devas esti, laŭ nia opinio, la komunikilo por nia tuta membraro, la informilo de niaj laboroj kaj klopodoj antaŭ aliuloj, kunligante iniciativojn, kaj la plej efika vojo por la homoj, kiuj, kun malsamaj lingvoj, deziras la necesan interkompreniĝon.

Ke "NIA PONTO" estu simbolo de plia aktiveco ekde la 80ª datreveno de la fondiĝo de nia Grupo kaj ĝuste ĉe la sojlo de la 1ª jarcento de la Esperanta vivo.

HISPANE HISPANE HISPANE HISPANE HISPANE HISPA

Esperamos que el nacimiento de "Nuestro Puente" sirva, como indica su título, de instrumento de unión y trabajo para todos los miembros de nuestro Grupo.

VASKE VASKE VASKE VASKE VASKE VASKE VASKE

"GURE ZUBIA" izeneko aldizkariaren jaiotasuna, gure arteko maitasuna pizteko tresna bezala balio duela, espero dugu.

## “NIA PONTO” – 100 numeroj.

Ĉu vi memoris pri la unua numero de “NIA PONTO”? Ĉu vi ankoraŭ havas ĝin en via hejmo? Nekredeble, sed tiu-ĉi, kiun vi nun legas, estas la numero 100. Jam pasis 27 jaroj ekde tiu unua, pri kies titolo tiom multe ni pripensis. Ĉu vi rimarkis ke ĝi ne estis sribita per komputilo, sed per kaduka tajpmaŝino?

Kelkaj eble diros ke ne estas multaj numeroj, sed post tiom da travivaĵoj kaj laboro, ĉiuj bilbaoaj esperantistoj devas senti sin orgojlaj kaj kun la emo marŝi al numero 200. Tamen, ni esperu ke oni ne postulos denove 27 jarojn.

# Nova Prezidanto de la E-Grupo de Bilbao.



Koincide kun tiu jubileo de “NIA PONTO”, ni havas novan Prezidanton: la 23-an de majo, en la ĉiujara asembleo de la E-Grupo de Bilbao, estis elektita nova estraro, kies Prezidanto estas Francisco López López (sur la supra foto).

## CUOTAS DEL AÑO 2014.

Si aun no has pagado la cuota de socio correspondiente al año 2014, es el momento de hacerlo. Te recordamos que las cuotas, vigentes desde hace varios años, son:

| | |
|---|---|
| Cuota normal: | 30,00 euros anuales. |
| Cuota reducida: | 15,00 euros anuales. |
| Cuota familiar: | 45,00 euros anuales. |

¡¡Muchas gracias por tu colaboración!!

**LOKE ...**

## KRISTNASKA LOTERIO.




Jam troviĝas ĉe nia sidejo la biletoj por ludi la tradician kristnaskan loterion. Ĉiu bileto kostas 5 eŭrojn: oni ludas 4 eŭrojn kaj oni donacas 1 eŭron al la E-Grupo.

Se vi deziras aĉeti ilin **per interreto**, enkontigu la monon ĉe “Kutxabank”, konto 2095-0141-41-2218001550 kaj ni sendos la biletojn per ret-poŝto.

## COMIDA DE ANIVERSARIO DEL GRUPO.



Kiel anoncite, la pasintan 24-an de majo, ni okazigis komunan manĝon en restoracio de Portugalete por festi la “naskiĝtagon” de la E-Grupo de Bilbao: la 20-an de majo ĝi iĝis 108-jara, do unu el la plej aĝaj en la tuta mondo.

Bedaŭrinde, ne multaj homoj emis atenti pri nia alvoko kaj ĉi-jare nur kvin ĉeestis la okazintaĵon.

Spite de tio, kiel kutime, estis ege agrabla etoso kaj ni ĉiuj bedaŭris la alvenon de adiaŭa horo.

## MENCIO PRI ESPERANTO.

En la hodiaŭa “Deia” oni povas legi pri ĉi tiu historia okazaĵo okaze de ĝia datreveno:
“*Ezkaba, la gran fuga de una cárcel franquista.*
*Según narraban los testigos, se urdió el plan con el esperanto como idioma, lengua que no entendían los centinelas y el resto de franquistas*”.

*(Anthony Sarm Dom. 18/05/2014)*

Ne estas tiel malgranda mencio. Pri tiu koninda okazaĵo mi verkis antaŭ precize unu jaro: http://www.delbarrio.eu/blo/2013/05/un-idioma-para-fugarse/
http://www.liberafolio.org/2013/esperantisto-gvidis-fugon-el-prizono-de-franco

*(Toño del Barrio. 19/05/2014)*

## ESPERANTO-FAKO EN DONOSTIA LIBREJO.

La librejo Kaxilda de Donostio montris sin interesata je mia propono starigi etan Esperanto-fakon. Venontan jaron aperos la unua Eŭska-Esperanto Vortaro kaj oni planas reviziitan eldonon de la lernolibro Esperantoa Ikasgai. Dume estus interese disponigi iujn aliajn lernolibron kaj vortaron kaj literaturo rilatanta kun la Laborista Esperanto Movado. Mi pensas pri maksimume tri aŭ kvar libroj, sufiĉe por interesigi kaj informi la klientaron sed ne trosarĝi la librejanoj.

La kondiĉojn por la disponigo de la libroj ni starigu kaj mi peros inter ni kaj la librejo. Se necese mi pagus la librojn kaj poste, se ili estos venditaj mi rericevos la monon.

*(Nikolas Xil Carvalho. 21/09/2014)*

## MENCIO DE LA LINGVO EN AKTUALA ROMANO.

Juan José Millás, “La mujer loca”. Pg. 209 de 238.

-Lo de la lengua materna -dice al fin Millás- me ha traído a la memoria que mi padre era esperantista. Hace tiempo, después de leer una biografía de Zamenhof, el inventor del esperanto, escribí un artículo sobre ese idioma.

-¿Qué decía usted?

-Lo relacionaba con la nostalgia del idioma único existente antes de la torre de Babel.

-¿El esperanto -dice la psicoanalista- vendría a reparar la herida que se produjo en la torre de Babel, cuando Dios confundió las lenguas de los hombres?

-Quizás si, aunque con una prótesis imposible, pues se trata de una lengua profundamente antimaterna.

-¿Y?

-Que quizá no prosperó por eso, porque no llevaba incorporada la posibilidad del incesto.

-No sé si es la conclusión adecuada -dice la psicoanalista-, pero lo tenemos que dejar por hoy.


*(Ricardo Biurrun. 25/08/2014)*

**H.E.F.**

## ĜUI LA HISPANAN KONGRESON RETE.

La 73 a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu kune kun la 18 a Andaluzia Kongreso disvolviĝis en la urbo Arundo (Ronda) inter la 1a kaj la 4a de majo 2014, estas nun ĝuebla en la reto por tiuj kiuj ne povis ĝin partopreni. Dum tiuj ĉi tagoj filmetojn tie registritajn oni iom post iom montras en la jutuba kanalo de Hispana Esperanto-Federacio: http://www.youtube.com/user/esesperanto.

*(“Nia Voĉo”. Organo de Madrida E-Liceo. Junio 2014)*




## Bieroj “Zamenhof” kaj “Speranto”.

En Toledo, ligita al anarkiismaj rondoj, kreiĝis kooperativo de bierfarantoj nomata "Speranto". Unu el iliaj bieroj nomiĝas "Zamenhof", kaj ĝi estis prezentita meze de majo en librejo "La libre de barrio" en Leganés. Pliaj informoj: https://www.facebook.com/bassbeer1

*(“Nia Voĉo”. Organo de Madrida E-Liceo. Junio 2014)*

## Edziĝo.

Nia samurbano kaj samgrupano Pedro Hernández edziĝis pasintan sabaton la 24an de majo, kun Balogi, el Bocvano. Ilin akompanis kelkaj esperantistaj amikoj. Gratulon! Ni aldonu ke Pedro Hernández estis la antaŭlasta Prezidanto de HEF.

*(“Nia Voĉo”. Organo de Madrida E-Liceo. Junio 2014)*

## «¡Qué bien canto en Esperanto … ! »

Ĉi-matene, kanto en radio ["Nómadas" el RNE 1] frapis min, kiam mi auskultis: "Qué bien canto en esperanto..."

Mi esploris la aferon kaj alvenis al kurioza kanto "La Torre de Babel" kiun ni devus koni (eble foje diskonigi). Temas pri grupo nomata "Los Enemigos" kaj pri ties albumo de 1990 "La vida mata". Foje estis kantata de "Siniestro Total"

Se vi scivolemas jen ligilo por auskulti gxin:

http://www.youtube.com/watch?v=_AxlwnxeENI

Kaj jen por spekti interpreton de Siniestro Total [la kapo de la kantisto memorigis min pri la kapo de la "biero Zamenhof"]

http://www.youtube.com/watch?v=rdrnzVhD5Kw

Krome, komentario pri la kanto kaj pri esperantistoj el lingvo-lernejo en Tirano:

http://networkedblogs.com/wCEsj

Jen la teksto de la kanto:

LA TORRE DE BABEL

Qué bien canto en esperanto
Cómo chano hablando italiano
Qué bien leo en arameo
Aunque algo brusco también leo etrusco

Me río de aquel
Castigo en Babel

En la mili aprendí suahili
Un borracho me enseñó el gabacho
Un día de huelga aprendí a hablar belga
Soy tan obtuso que también sé ruso

Me río de aquel
Castigo en Babel

Soy todo un genio transcribiendo armenio
Entre otros vicios contesto en egipcio
Doy bien el pego hablando el galego
En el mako aprendí el polaco

Me río de aquel
Castigo en Babel

Qué bien canto en esperanto

## "ESPERO?": E-filmo premiita en Zaragozo.

En Zaragozo okazis film-festivalo nomata "Ecozine". Kaj -bona surprizo- unu el la premioj estis por mallonga filmo (4 min. 21 sek.) originale en esperanto.
Kaj -bonega surprizo- eblas spekti gxin per interreto. Jen: http://vimeo.com/71742636

La titolo estas "Espero? (Hope)". Jen informado pri la direktoro Simone Giampaolo kaj ties filmo(j):
http://simonegiampaolo.com/
http://simonegiampaolo.com/page/2/

Kaj jen pri la filmo: https://www.facebook.com/esperohope

La traduko al esperanto estis farita de Mariana Evlogieva


*(Lorenzo. 23/05/2014)*

## Invito de la pola ambasado.

La Ambasado de Pollando en Madrido invitis la Hispanan Esperanto-Federacion al formala festo kunmemoranta Nacian Feston de Pollando kaj la 25-an datrevenon de la unuaj demokrataj elektoj en la lando. Ĝi okazos morgaŭ merkrede la 4-an. Mi konfirmis mian ĉeeston. Kaj poste rakontos ĉion rakontindan.

*(José Antonio del Barrio, Prezidanto de HEF. 03/06/2014)*

## TRA LA MONDO …




Loĝantaro kiu kapablas babili en la angla laŭ la diversaj landoj de Eŭropa Unio.

*(Kaptita en Interreto. Junio 2014)*

## ESPERANTISTAJ JUNULOJ EN LA EŬROPA PARLAMENTO.

Inter la 9-a kaj la 11-a de majo estis organizita en la sidejo de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo renkontiĝo de reprezentantoj de internaciaj asocioj de la Eŭropa Unio, en kiu partoprenis ĉirkaŭ 5.000 junuloj. Ĉeestis ampleksa grupo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), inter kiuj Enric Baltasar, de la Valencia Esperanto-Asocio.

La renkonto, nomita EYE2014, konsistis el granda kvanto da prelegoj, debatoj, koncertoj, distraj kaj alitipaj aktivaĵoj, ĉefe en la sidejo de la Parlamento sed ankaŭ en la urbo Strasburgo, sub la devizo "Ideoj por pli bona Eŭropo".

La esperantistaj partoprenantoj ĝuis la okazon montri al la ceteraj partoprenantoj kaj al la laborantoj en la Eŭropa Parlamento, ke Esperanto estas lingvo funkcianta kaj ebliganta komunikadon inter junuloj el la tuta kontinento.

*("La Bitbulteno" de HEF. Num. 7. 20/05/2014)*

## Fajro en iama domo de Zamenhof.

En vendredo en Grodno, Belorusio, okazis incendio en duetaĝa historia konstruaĵo, en kiu dum kelkaj jaroj loĝis Ludoviko Zamenhof kun sia familio. La rekonstruata domo ŝajne ne serioze difektiĝis.

La familio de Ludoviko Zamenhof loĝis en Grodno de 1893 ĝis 1897, ĉefe pro financaj kialoj. Fine de la 1880-aj jaroj, post la publikigo de Unua Libro, li estis tute senmona. Granda parto de la doto de la edzino, Klara Zilbernik, estis elspezita por Esperanto, kaj la kuracista praktiko de Ludoviko Zamenhof en Varsovio ne prosperis.

Legu komplete ĉe: http://www.liberafolio.org/2014/fajro-en-domo-de-zamenhof

## MALGAJA NOVAĴO.



La lastan tagon de la 99a Universala Kongreso de Esperanto en Buenos Aires forpasis Andrzej Grzębowski en aĝo de 71 jaroj. Flama Esperanto-aktivulo, membro de multaj E-organizaĵoj, Prezidanto de Internacia Klubo "Esperantotur" en Bydgoszcz, Pollando**,** mondvojaĝanto, kiu vizitis pli ol 204 landoj de la mondo, aŭtoro de pluraj libretoj kaj mapoj pri diversaj landoj de la mondo kaj la tutan vivon laboris p**or** internacia Esperanto-edukado kaj la apliko de Internacia Lingvo Esperanto en turismo. La Adiaŭa Ceremonio kaj entombigo okazos en Pollando, tombarejo Bydgoszcz – Bielawki en la unua ebla dato, post fino de diplomatiaj formalaĵoj.

Interalie, li ankaŭ partoprenis la eŭropan kongreson en **Bilbao (2004)**, kien veturis per buso, alportante trupon de junaj dancistinoj.

## KIOM DA E-UZANTOJ TROVIĜAS EN LA MONDO?

Tio estis la ĉefa temo de miaj prelegoj dum la Itala Kogreso kaj AMO-5, kies prezentaĵo estas nun videbla rete: http://www.slideshare.net/amriw/esperanto-informado-irete.

La bazajn liniojn de tiu metodo mi prezentis en la komitata listo jam antaŭ unu jaro kaj duono kaj en Revuo Esperanto antaŭ unu jaro. Pli detala kaj science prilaborita versio de tiu tezo aperos (angle) en la lingvistika ĵurnalo INDECS komence de 2015.

La nuna prezentaĵo havas ĝisdatigitajn datumojn kaj argumentojn. I.a. ĝi konservative supozas ke nur ĉiu tria Facebook-ano kiu pretendas pri E-parolado estas serioza kaj provas taksi nur la E-uzantojn en la interreto. Tio donas ciferon de ĉ. 2 milionoj.

Se oni emas esti malpli konservativa ol en la prezentaĵo, supozante ke duono (anstataŭ triono) de la asertoj en Facebook estas seriozaj kaj ke inter la senreta parto de la homaro troviĝas simila nombro da E-parolantoj al la nombro inter la retuzantoj, la takso plialtiĝas al ĉ. 4 milionoj.

*(Amri Wandel. 31/08/2014)*

## MEMBROSTATISTIKO DE UEA JE 1 SEPTEMBRO.

La membronombro daŭre oscilas ĉirkaŭ la nombro je la sama dato en 2013: la 1-an de junio estis 9 membroj malpli, la 1-an de julio 21 membroj pli kaj la 1-an de septembro denove 10 membroj malpli. La tuta membraro je la 1-a de septembro estis 4782. Mankas ankoraŭ 121 de la fina nombro en 2013 (4903). Kun la ĝisnuna ritmo tiu nombro estas atingebla, sed por atingi 5000 ĉi-jare, la ritmo devos pliviglîĝi.

Laŭkategorie la nombroj estis (interkrampe komparo kun 1 septembro 2013): Membro kun Gvidlibro 397 (+47), juna MG 37 (+14), Membro kunJarlibro 1219 (-33), juna MJ 233 (+35), Membro-Abonanto 1844 (-103), juna MA 73 (+4), Dumviva Membro 772 (-3), juna DM 14 (+1), DM kun Jarlibro 127 (+28), juna DMJ 15 (+1), Honora Membro 45 (-1), Honora Patrono 6 (sama).

*(Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA. 01/09/2014)*